KONTAKTO

NUMERO 324
(2025:3)
ISSN 0023-3692

"Legado estas tre grava afero en mia vivo."

Dumonata socikultura revuo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), eldonata de Universala Esperanto-Asocio (UEA). Fondita en 1963.

N-ro 324 (2025:3), 63-a jarkolekto – ISSN **0023-3692**.

Legata en ĉ. 90 landoj.

TTT-paĝo: **https://www.tejo.org/agadoj/revuo-kontakto/**

Retadreso: **kontakto@tejo.org**

Eldonanto (administrado, abonoj, anoncoj): UEA.

Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Tel.: +31 10 436 1044
Faks.: +49 30 364280169
Ret-adreso: uea@co.uea.org

Redaktoro: **Karina Oliveira**

Movada Rubriko: **Ikvero Almeida**

Enpaĝigo: **Iris Polachini**

Presado: **Damen Drukkers**

Korektado: **Tatu Lehtilä kaj Tobiasz Kubisiowski**

Kovrilo: **Eder Benedetti**

Kunlaborantoj de tiu ĉi numero:

Eder Benedetti, Anne Schill, Ulo de Esperantujo, Jaes Estrada, Stela Besenyei-Merger, Alessio Giordano, Laís Lyra, Tokiko Komaki, Amir Naor, István Ertl, Max Elbo kaj Ikvero Almejdo.

Anonctarifo: tutpaĝa 350 €, 1/2-paĝa 190 €, 1/4-paĝa 100 €, 1/8-paĝa 55 €, 1/16-paĝa 30 €. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas duoble. Por e-organizaĵoj 50% da rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas makleraĵon de 30%. Por anoncoj bv. kontakti UEA. Anoncetoj: por anonctabulo 0,50 € / vorto: minimuma fakturado de 10,00 €. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA.

Abontarifo: varias laŭlande. Kontrolu ĉe nia retpaĝo kaj ĉe la fino de la revuo.

: @revuokontakto

La opinioj de la unuopaj aŭtoroj kaj de la redaktoro ĉi tie esprimitaj ne nepre spegulas la opinion de TEJO aŭ UEA, kiuj ne respondecas pri ili.

INFORME

Se vi volas paroli kun aliaj personoj pri la artikoloj kiuj aperas en Kontakto, vi povas fari tion en grupo en Telegramo, kreita por tiu celo: *mallonge.net/legantojdekontakto*

Jam disponeblas aliĝilo por la UK 2026 en Graz: https://uk.esperanto.net. Junuloj rajtas je signifa rabato dum la nuna, plej favorpreza aliĝperiodo, kiu finiĝas la 15-an de decembro 2025.

REAGOJ

Dum mi estis Prezidanto de TEJO, *Kontakto* estis unu el miaj estraraj respondecoj. Kaj dum longa tempo, en mia kapo *Kontakto* egalis al streĉiĝo. Mi mem devis verki multe, la teamo tute ŝanĝiĝis, kaj estis granda nestabileco en la aperritmo.

Ni anoncis Karina kiel la novan redaktoron dum IJK 2023, kaj nun kiam mi verkas tiujn ĉi vortojn dum IJK 2025 – salutojn el Indonezio! – tiu antaŭa periodo nun ŝajnas tre for. Mi bedaŭras ke Karina ne plu estos la redaktoro, sed dankegas ŝin por la laboro kiun ŝi faris dum la pasintaj 2 jaroj. Mi vere ĝuis la numerojn (nun ĝustatempe alvenantajn!) kaj kredas ke *Kontakto* nun estas en tre forta stato por la sekva redaktoro. Dankon Karina!!

TYRON, PER TELEGRAMO

Enhavo

Redakcie 3
Libroj (2023–2025) 4
Bobelarto: Nuntempa literaturo en viaj oreloj! 7
Mozaiko 1 10
La papusoj de la poploj 12
Tiel la mondo... bruas 15
Krucvortenigmo 16

MOVADA RUBRIKO

Junulara Renkontiĝo de Brazila Nordoriento 17
Dum IJF 2025... 19
Mocio el TEJO Aprobita ĉe Forumo Junulara Eŭropa 22

Redakcie

Jen mia lasta numero de la revuo por vi. Mi tre ĝuis mian redaktoran tempon kaj mi kore dankas al ĉiuj kunlaborantoj (mi ne mencias ĉiujn ĉi tie ĉar estis vere multaj). Estis tre aminda sperto labori kun homoj de tiom da diversaj lokoj kaj kun tiom da diversaj interesoj kaj kapabloj.

La kovrila artikolo de tiu ĉi numero estis verkita de mi mem, por iom celebri tiujn du jarojn dum kiuj mi plenumis la postenon. La ilustraĵoj por la teksto estis faritaj de Anne Schill, tre talenta junulino kiun mi ekkonis dum NASK ĉijare. Dankon, Anne!

Mi ankaŭ volas aparte danki al Eder Benedetti, kiu kreis multajn kovrilojn por la numeroj de la revuo sub mia respondeco. Mi kaj li partoprenis en nia unua kurso de Esperanto kune, en 2008, kaj estas granda ĝojo povi teni amikecon tiom longe kaj havi tian kreeman kunlaboron pri io kion ni ambaŭ tiom ŝatas. Dankon, amiko!

Apartan dankon ankaŭ al la provlegantoj de la tekstoj!

Ĉeestas en la numero ankaŭ aliaj kutimaj tekstoj, kiel por la sekcioj pri *Bobelarto*, *Drogoj*, *Tiel la mondo*..., *Krucvortenigmo* kaj la ĵus komencita serio de tekstoj *Mozaiko*.

Mi ĝojas ke *Kontakto* havas nun novan, entuziasman redaktoron, kaj mi deziras multe da sukceso al Thiago. Bonvole subtenu lin, sendu artikolojn, komentojn, reagojn, proponu kunlaboron ktp. Mi mem eble revenos al sporada verkado de artikoloj por la revuo nun ke mi havos iom pli da libera tempo...

Ĝis iam, karaj legantoj!

Karina

Mi ricevis la novaĵon, ke mia kandidatiĝo estis elektita por la posteno dum somerkurso de la kataluna – pli precize dum mi serĉis romanojn en librovendejo en Valencio; vi povas ja imagi la reagojn ridetajn de la libristoj. Al vi, kara leganto, mi prezentas min. Mi nomiĝas Thiago, naskiĝinta kaj loĝanta en San-Paŭlo, Brazilo, redaktoro de Kontakto ekde la venonta numero. Kaj informas: vin, leganto, mi kaŝe celas iom delogi de nura legado! Se vi havas ideon por verki aŭ verkaĵon pretan, ne hezitu kontakti min, ĉar mi kuraĝigas, ke ni kune laboru, por ke viaj pensoj ektrovu specialan spacon por gajni korpon kaj dissendi informojn. Ankaŭ bonajn novaĵojn vi povas atendi! Mi konsilas, ke vi sekvu *Kontakton* en la sociretoj kaj partoprenu la adan renovigon de nia plej ŝatata revuo. Finfine, mi danke gratulas al Karina pro ŝia diligenta laboro kiel redaktoro de *Kontakto*. Trans iro ĝis sopiro, vi ĉiam bonvenos ĉe ĝi!

Thiago B Assumpção



Tokiko Komaki

Libroj (2023–2025)

Por la unua numero kiun mi redaktis (312 – 2023:1), la ĉefartikolo temis pri la 60-jariĝo de *Kontakto*, kaj estis unu el la malmultaj ĉefartikoloj kiujn mi verkis dum tiuj du jaroj (sed tamen du jarkolektoj kaj duono). Por tiu ĉi lasta numero pri kiu mi zorgas, mi decidis denove aperigi iun artikolon verkitan de mi mem, ĉi-foje pri io pli persona.

Legado estas tre grava afero en mia vivo, do mi elektis kelkajn librojn inter tiuj, kiujn mi legis dum mia redaktora tempo kaj prezentas ilin ĉi tie por vi. Espereble tio estos interesa kaj instiga por viaj estontaj legadoj!

HEARTSTOPPER ["Koro-haltiganto"] (Alice Oseman)

Mi spektis la serion *Heartstopper* en *Netflix* kaj estis absolute ravita de ĝi. Ĝi estas ege ĉarma kaj pritraktas temojn kiuj estas gravaj por adoleskantoj kaj junaj plenkreskuloj. Kiam mi malkovris ke la serio estas bazita sur bildstrioj de Alice Oseman, mi tuj volis eklegi ilin. Laŭ mi, ŝi pritraktas pezajn temojn (kiel mensa sano) tre respondece kaj mi admiras ŝian laboron. Dum la lastaj jaroj mi legis plurajn librojn de ŝi, ne nur la bildstriojn de *Heartstopper*, kaj malgraŭ tio ke kelkaj el ili ne estas tiom interesaj el mia aĝa vidpunkto, en ĉiuj estas io por lerni pri la glata komunumo, kaj mi ja ŝatas legi librojn el kiuj mi povas ĉiam lerni ion, do mi dirus ke ĉiuj ŝiaj libroj estas indaj.

COLORLESS TSUKURU TAZAKI AND HIS YEARS OF PILGRIMAGE[1] ["Senkolora Tsukuru Tazaki kaj liaj jaroj de pilgrimado"] (Haruki Murakami)

Murakami estas verkisto kies nomon mi jam aŭdis plurfoje, sed tiu estis la unua (kaj ununura) libro kiun mi legis de li ĝis nun. Estis tiel ke dum 2024 mi partoprenis en "lega defio" kun amikino, kaj ni devis trovi librojn kiuj apartenis al specifaj kategorioj laŭ la

1 "色彩を持たない多崎つくると、彼の巡礼の年" en la japana.

ŝablonaj indikoj de la defio. Tiu ĉi estis en la kategorio "magia realismo". Ĝi pritraktas iun traŭmaton kiun la ĉefrolulo havas ekde sia infanaĝo, nome ke li havis grupon de amikoj kiuj estis tre proksimaj, sed subite ĉesis paroli kun li, kaj post jardekoj li ankoraŭ ne scias kial. Do li ekprovas rekontakti la personojn por malkovri kio okazis, ĉar eĉ se pasis multe da tempo lia vivo daŭre estas influita de tiu malbona okazaĵo.

LA BESTO-FARMO (trad. G. Tucker, Munkeno 1970, *Animal Farm*, George Orwell)

Mi ĝis nun memoras kiom impresita mi estis kiam mi legis *1984*, de George Orwell. Tio okazis eble jam antaŭ jardeko, kaj ekde tiam mi ĉiam volis legi ion pli de li. Pasintjare mi ricevis kiel donacon la libron *La Besto-farmo*, kaj ĝia legado estis tre pensiga. Ĝi estas sufiĉe mallonga rakonto, sed ĝia enhavo estas tre aktuala por ni, ĉar ĝi montras kiel diktatoremaj reĝimoj povas subpremi minoritatojn. Trafis min speciale forte tio, ke ne ĉiuj bestoj scipovas legi, kaj tiuj kiuj ne havas tiun kapablon ne vere povas kontroli la unuajn regulojn (skribitaj surmure) de la besta reĝimo post kiam la homoj estas forigitaj de la bieno. Tiel, edukado iĝas armilo, kaj tiuj kiuj havas pli da kono povas kontroli aliajn pli facile, kio estas terura afero (sed kiu ja okazas daŭre en multaj el niaj socieroj).

SPARE ["Rezervulo"] (Princo Harry)

Monarkio por mi ĉiam estis afero de la pasinteco, ĉar en lernejo mi lernis pri la monarkia tempo en Brazilo, sed delongege la lando forigis tion. Do, ravas kaj konsternas min ke ankoraŭ ekzistas monarkiaj familioj en nia nuntempa socio, kaj mi ĉiam volas kompreni pli bone kiel tio funkcias. Princo Harry forlasis siajn monarkiajn devojn kaj privilegiojn en Britio kaj li rakontas ĉion pri tio en tiu ĉi libro.

AMERICANAH ["Usonema"], ***PURPLE HIBISCUS*** ["Purpura hibisko"], ***HALF OF A YELLOW SUN*** ["Duono de flava suno"] (Chimamanda Ngozi Adichie)

Post la legado de tiuj tri libroj, mi ofte pripensas: "kiel povas esti, ke mi ne legis la librojn de Chimamanda Ngozi Adichie antaŭe en mia vivo?". Mi supozas ke la unua (*Americanah*) estas mia plej ŝatata, ĉar ĝi pritraktas plurajn interkulturajn aferojn. La ĉefrolulino estas niĝeriano kiu iras al Usono por vivi tie dum iom da tempo. Tamen, mi ankaŭ multe ŝatis la du aliajn. En *Half of a Yellow Sun* oni povas multe lerni pri la historio de Niĝerio, sed ĝi havas fortajn perfortajn militajn scenojn, do se vi estas sentema pri tiuj aferoj tiu ĉi ne estas la plej bona libro por vi.

ONE LIFE ["Unu vivo"] (Megan Rapinoe)

Mi neniam aŭdis pri Mega Rapinoe antaŭ ol legi ŝian biografion, sed ŝajne ŝi estas sufiĉe fama en la mondo. Ĉar ŝi estis profesia futballudanto, la libro multe pritraktas tiun temon, kio ne vere interesas min ĝenerale, sed la fokuso estas futbalo por virinoj kaj kiel profesiaj sportludantaj virinoj ne estas aprezataj same kiel la viroj, do ĝi estas libro kun fortega feminisma fono, kio kompreneble estas ĉiam plaĉa. Cetere, la libro multe fokusiĝas pri antaŭjuĝoj kontraŭ minoritatoj.

GENDER QUEER: A MEMOIR ["Genrokvira: memorlibro"] (Maia Kobabe)

Tiu ĉi bildstrio estis tre plaĉa por legi. Maia Kobabe rakontas pri sia vivo kiel neduuma neseksemulo en tre bela maniero. La libro estis malpermesata en pluraj lokoj en Usono, pro premo de konservemuloj, kaj nur tio fakte jam indikas ke ĝi estas leginda, ĉu ne?

PRIDE AND PREJUDICE ["Fiero kaj antaŭjuĝo"], ***SENSE AND SENSIBILITY*** ["Prudento kaj sentemo"] (Jane Austen)

Mi unue ekkonis la rakontojn de Jane Austen dum mia adoleska vivtempo, ĉar mi spektis la

filmon *Pride and Prejudice* el 2005 kaj ege ŝatis la rolulon Elizabeth Bennet, pro ŝiaj fortaj opinioj kaj la maniero per kiu ŝi alfrontas socion kiu estis sufiĉe maljusta por virinoj. Post tio mi legis ĉiujn librojn de la verkisto kiam mi estis ankoraŭ sufiĉe juna, kaj lastatempe mi relegis ilin, kadre de iu libroklubo kiun mi kaj amikino kreis en la urbo kie ni loĝas. *Pride and Prejudice* kaj *Sense and Sensibility* estas miaj plej ŝatataj, ĉar mi opinias ke la dialogoj estas pli interesaj kaj multe pritraktas la sentojn kaj agmanierojn de la roluloj en saĝa/sprita maniero.

TOMORROW, AND TOMORROW, AND TOMORROW ["Morgaŭ kaj morgaŭ kaj morgaŭ"] (Gabrielle Zevin)

Tiu ĉi libro estis bona surprizo por mi. Mi eklegis ĝin kadre de mia lega defio de 2024, kaj la kategorio estis "libro, kiu havas videoludojn centre en la rakonto". Mi neniam estis aktiva ludanto de videoludoj, do mi ne tiom interesiĝis pri la temo, sed la libro montriĝis ege kortuŝa kaj pensiga. Ĝi rakontas historion de du amikoj kiuj havas videoludan entreprenon kune, kaj dum jardekoj en la vivo ili kunlaboras, kverelas, amas unu la alian, esence, havas tre kompleksan amikecon. Mi lernis multe pri tio kiel videoludoj estas kreataj en pli detala maniero, kaj tio estis interesa (precipe pro tio, ke dume ankoraŭ estis la rubriko de Jonny M. pri videoludoj en Kontakto, do estis bone iom pli multe kompreni pri la tuta industrio).

KOIRIEN KALEVALA ["Hunda Kalevala"] (Mauri Kunnas, Tarja Kunnas)

Eble vi jam aŭdis pri Kalevala, la tiel nomata epopeo de la finna popolo, kompilita de Elias Lönnrot. Tiun libron mi ne legis ankoraŭ, sed mi legis infanan bilstrian version de ĝi, kun roluloj kiuj estas bestoj, en tre ĉarma adapto. Estis malfacile por mi kompreni la kulturajn aferojn en ĝi, mi devis multe demandi al mia finna partnero kion ili signifas, sed fine mi tre ŝatis ĝin. Estas multaj elementoj de Kalevala kiuj gravas por kompreni la finnan kulturon, do mi ĝojas ke mi legis ĝin (eĉ se mi iom ruze elektis la infanan version por legi).

NEEKSKLUZIVAJ RILATOJ JA INDAS[2] (Oliver Schott, traduko[3] de Kirilo Brosch)

Tiu ĉi estas tute freŝa libro eldonita en Esperanto, kaj mi profitas por reklami ĝin! Ĝi estas sufiĉe mallonga, sed plena je interesaj informoj. La aŭtoro argumentas kial kaj kiel neekskluzivaj rilatoj estas avantaĝaj, kaj laŭ mi ĝuste la koncizeco kaj logikeco de la argumentado estas unu el la fortaj trajtoj de la libro.

DOWN WITH THE SYSTEM: A MEMOIR ["For la sistemon: memorlibro"] (Serj Tankian)

Tiu ĉi libro estas membiografio de la ĉefkantisto de la muzikgrupo *System of a Down*, kiu en si mem jam estus interesa por mi, ĉar la muzikgrupo estis unu el miaj plej ŝatataj kiam mi estis pli juna. Tamen, krom tio, Serj Tankian multe rakontas pri la historio de Armenio kaj pri la armena genocido. La libro multe pritraktas internacian politikon, interkulturajn aferojn kaj, kompreneble, ankaŭ la vojlinion de la muzikgrupo.

Karina Oliveira
Brazilo/Finnlando

2 Ĝi aĉeteblas ĉe UEA: *https://katalogo.uea.org/?inf=7406* (kaj ĉe aliaj retaj vendejoj)

3 "Lob der offenen Beziehung" en la germana.

Nuntempa literaturo en viaj oreloj!

Jam la kvaran fojon revenas la podkasto-serio de la Interkultura Novelo-Konkurso. Ankaŭ ĉi-foje vi povos malkovri novelojn antaŭ la oficiala lanĉo de la novelaro.

Ni prezentos al vi dek novelojn el inter la finalistoj: kelkaj estis originale verkitaj en Esperanto, la aliaj en la itala, la rusa, la ukraina aŭ la persa. La novelojn laŭtlegos diversaj personoj de ĉirkaŭ la mondo, do vi povos aŭdi krom la interesaj rakontoj diversajn akĉentojn kaj prononcojn de Esperanto en la serio.

Se vi mem volonte laŭtlegus novelon por kontribui per via voĉo, tiam ne hezitu! Ni akceptas volontulojn al nia teamo! Skribu al: **info@bobelarto.ink**

Vi povas aŭskulti la tri antaŭajn seriojn en la YouTube-kanalo de Bobelarto, kie inter aliaj ankaŭ la ĉi-suba novelo aperis.

La enkondukan epizodon ni lanĉis la 15-an de julio, kaj la unuan novelon vi povas aŭskulti jam de la 22-a de julio!

Poste, la kvaran mardon de ĉiu monato vi povos ĝui novan epizodon. La serio daŭros ĝis la novelaro aperos en aprilo 2026.

Bonan aŭskultadon al vi!

youtube.com/@bobelarto

Jaes Estrada
Peruo

Stela Besenyei-Merger
Hungario

Ni ĝojas prezenti al vi, el la tria eldono de INK, la novelon "Etfingropromeso", verkita originale en Esperanto de Akiko Ĵin el Japanio. Tiu ĉi novelo estis voĉlegita en nia podkasto de Luna el Portugalio. Skanu la QR-kodon por aŭskulti ĝin! Kaj kompreneble abonu nian kanalon por ke vi estu inter la unuaj aŭskultantoj de la nova podkasto-serio!

Etfingropromeso

"Se vi rompis promeson, oni glutigos mil kudrilojn. Ni tranĉis fingrojn."

Infanoj promesis ion, svingante siajn etfingrojn interplektitajn supren kaj malsupren. Tiuj frazoj por promeso estis delonge popularaj inter infanoj. Mi svage rigardis la scenon. Ankaŭ mi faris etfingropromeson kun mia frato en mia infaneco. Pri kio ni promesis? Mi provis rememori, sed tre baldaŭ verdiĝis la signalo kaj mi startigis la aŭton malrapide.

Mi survojis al la urboranda hospitalo, kie mia patro forpasis ĉi-matene. Li havis kanceron. Mi pretis akcepti lian morton. Nur restis ke mi forsendu lian animon trankvile. Por tio, mi veturis horojn kaj alvenis la hejmurbon, kiun mi longe evitis. Kien ajn oni iras, troviĝas bonsajoj en tiu ĉi urbo, ĉar la urbon pioniris bonsajistoj. Antaŭ jarcento, ili amase translokiĝis de Tokio, kie ili perdis ĉion pro tertremego.

Mi fine alvenis en la hospitalon posttagmeze. Mi uzis specialan lifton, kiu kondukis al la subtera etaĝo du, kie troviĝas kadavrejo. Antaŭ la ĉambro atendis mia onklo. Li kondolencis kaj demandis:

"Kial via frato ne venis kun vi? Kiam li alvenos?"

"Li estas eksterlande kaj revenos tuj kiam li povos akiri flugbileton. Plej frue postmorgaŭ. Do mi respondecas pri aranĝo de funebraĵoj", mi respondis.

La onklo montris konfuzitan mienon, sed diris, elprenante ion el sia valizo:

"Ankaŭ mi volas fingron de mia fratego. Detondu la etfingron kaj metu ĝin en ĉi tiun skatoleton." Li alpuŝis al mi lignoskatoleton.

Mi ne kaptis la vorton. "Vi volas... fingron?", mi redemandis.

"Ĉu vi komprenas nenion? Ĉu vi nenion aŭdis pri nia familio?" Li komencis rakonti: "Homoj ĉi tie longe sin vivtenis vendante bonsajojn. Oni enfermas la bonsajojn en malgrandan florpoton kaj

ĉiujare fortondas iliajn etendiĝintajn radikojn. Iun jaron bonsajoj ne povis plu elteni tiun suferadon kaj ekvelkis amase. Provizite per sufiĉe da akvo kaj nutraĵo, la bonsajoj tamen ne resaniĝis. En la situacio, la vilaĝestro alparolis al bonsajoj: 'Mi ne vivos longe. Kiam mi mortos, mi donos al vi ĉiujn miajn fingrojn. Do, reviviĝu. Alimaniere, ni ne povas vivi.' Baldaŭ li mortis. La ĉefoj de dek bonsajvendejoj detondis po unu fingro de la vilaĝestro per ŝtala tondilo, kun larmoj en siaj okuloj. Tiun fingron kun sekiĝantaj karno kaj sango ili ofere enterigis en sian plej karan bonsajpoton. Ĉiuj bonsajoj tuj vigliĝis kaj elmontris plej majestan formon ol iam ajn. Ekde tiam, la dek familioj daŭre dediĉas fingron al la bonsajo kiam la ĉefo mortis. Ni, unu el la dek, ankoraŭ oferas fingron kiel simbolon ke ni neniam difektos la kunvivan rilaton."

"La familiaj bonsajoj subtenas nin ne nur ekonomie. Ili rekompencas nin pro la fingroj." Li faris seriozan mienon. "Kial demenco maloftas ĉi tie? Kial sinmortigo ne estas en la kvartalo? Kial energifluo laŭ fengŝuo bonegas? Ĉio estas kontribuo de granda forto de bonsajoj al kiuj ni dediĉadas la fingrojn. Ankaŭ via patro povis foriri al la transmondo trankvile kaj sendolore, rememorante siajn plej feliĉajn tagojn, danke al ili. Ni ne povas vivi sen bonsajoj. Do ni devas plenumi la promeson", klare diris mia onklo kaj levis sian etfingron apud sia vizaĝo.

"Via fratego, la posteulo de la familio, ne ĉeestas nun. Mi plenumos nian devon anstataŭ li. Kial via patro ne diris tiun gravan aferon al sia filino? Li restis timemulo ĝisfine. Tial li estis forlasita de via patrino", murmuris la onklo.

"Kion vi diras? Ne insultu miajn gepatrojn!", mi kriis.

"Mi ne kredas vian rakonton! Estas frenezaĵo doni fingron! Se vi vundos la korpon de mia patro, mi vokos policon", mi furiozigis. "Tuj malaperu de mia vido!", mia krio eĥis tra la koridoro. Haste mi redonis al li la skatoleton, kiun li trudis al mi. Li fiksrigardis min.

"Mi ne scias, kia teruraĵo okazos. Se vi rompis promeson, oni glutigos al vi mil kudrilojn", li sputis insultojn kaj foriris.

Trankviliginte mian menson konfuzitan, mi eniris la kadavrejon. Mia patro estis kuŝigita sur la lito. Mi levis la blankan tukon de lia vizaĝo. Lia mieno estis surprize trankvila. Karesante liajn jam malvarmajn manojn, mi dankis lin pro lia dumviva amo al mi. Mi preĝis, ke lia animo liberiĝu kaj eniru en eterne pacan mondon. Mi adiaŭis kapkliniĝante. Tiam mi rimarkis la familian pinbonsajon en la angulo. Mi elportis ĝin kaj veturis hejmen.

Aŭtuna ĉielo estis alta kaj klara. Survoje mi vidis tra la heĝo maljunulojn zorgi pri bonsajoj en korto. Estis nur unuetaĝaj domoj, do oni povis vidi malproksimen unuvide. Ĉi tiu tereno ĉirkaŭata de kvar larĝvojoj, kiuj nomiĝas laŭ vojflankarboj: Acer-vojo, Gink-vojo, Sakur-vojo kaj Salik-vojo, estis la plej malnova parto de la urbo. Tiuj kvar vojoj povis esti kiel bariloj, kiuj malpermesas al fremduloj eniri. Ĉirkaŭaj pejzaĝoj ne ŝanĝiĝis. Mia avino kutimis diri, ke ĉi tie estis paradizo. Nia hejmo ĉe Acer-vojo, internis en la bariloj, kaj ruĝaj falintaj acerfolioj kovris ties forlasitan korton. Dispremante tiujn foliojn, mi parkis la aŭton. Malaperis multaj bonsajoj, kiuj iam estis sur la bonsajpodio en la korto. Verŝajne mia patro fordonis ilin al la najbaroj, sentante la finon de sia vivo. Malsupre mi trovis umebonsajon, kiu restis sola. Mi prenis kaj metis ĝin sur la supran breton, kune kun la familia pinbonsajo, kiun mi elportis el la hospitalo. Rigardante ilin, mi sidiĝis sur la verando por iom ripozi.

La nostalgiaj bildoj de la korto vekis forajn rememorojn. Antaŭ tiu oranĝarbo, ni rigardis la mirindaĵon ĉiujare kun mia frato. Hirundovosta papilio elirinta el sia krizalidŝelo malrapide etendis siajn flugilojn kaj ekflugis en la mondon. En apuda garbejo, ni kaŝis cikadoŝelon, kiam ni trovis ĝin. Ĉe la bazoj de tiu heĝo, teraraneoj ĉiam faris siajn sakformajn retojn. Ni ofte tranĉis ilin per tondilo por vidi la araneojn eliri. Tiam la avo akre riproĉis nin: "Infanoj, ne tuŝu tiun tondilon. Ĝi estas farita el *Jasuki-ŝtalo*, specife malmola materialo por japana glavo. Ĝi estas sufiĉe tranĉa por detondi eĉ homan fingron."

"Homan fingron?"... Neatendite mi rememoris la vortojn de la onklo.

Diversaj okazaĵoj sinsekvis en mia menso. Kiam ajn ni faris fingropromeson, geavoj sulkis fruntojn. Ĉu paroli pri "tranĉi fingron" estis tabuo? Kiam ni petis nian patron doni dorlotbeston, li diris:

"Absolute ne, ĉar kaj hundoj kaj katoj fosas teron." Ĉu estis io sub la tero? Ĉu la patro timis, ke bestoj elfosus ion kaŝitan en la bonsajpoto? Ankaŭ okazis tia afero. Niaj parencoj parolis:

"Akari florigas belajn florojn", rigardante ĉi tiun umebonsajon. Sed la nomo de mia patrino, kiu tiam prizorgis ĝin, ne estis Akari. Akari estis la nomo de mia forpasinta avino. Kiel mortinto florigis la florojn? Ĉu la ostoj de mia avino enteriĝis en umebonsajan poton? Mi rememoris ian onidiron pri malbeno de bonsajo. En la najbaraĵo, oni malkovris nenaturan kadavron. Ties buŝo estis plenplena de pinaj pingloj kvazaŭ oni glutigis al ĝi mil kudrilojn. En la momento reeĥiĝis en mia kapo: "Englutu mil kudrilojn."

Mi falis en timon. Estis nur unu maniero por certiĝi. Mi ĵetegis la bonsajojn teren. La potoj rompiĝis. Sed mi ne povis konstati ĉu ene estas

ostoj, ĉar la bonsajarbo kaj la potofundo estis ligitaj per drato. Mi tondis dratojn kaj elprenis la bonsajarbetojn. Je mia surprizo, iliaj densaj radikoj plenŝtopis la potojn. Por forigi la teraĵon ĉe radikoj, mi skuis la bonsajarbetojn. Tiam, pendis kelkaj kunvolvaĵoj de radikoj. Mi tenis la trunketon de la pinarbeto kun mia dekstra mano kaj kombis la pendantajn kunvolvaĵojn per miaj maldekstraj fingroj. La kernoj de kunvolvaĵo montriĝis momente kaj perdiĝis falinte en la sekigitajn acerfoliojn. Ili estis ostetoj. Radikoj kunvolviĝis multoble ĉirkaŭ ili. Tio ŝokis min.

Mia onklo pravis. Mi estas heredanto de familio, kiu oferadis fingron tra generacioj. Najbaraj homoj, kiujn mi vidis survoje, ne nur prizorgis la bonsajojn, sed eble parolis ankaŭ al la mortintoj. La malgranda kaj plata bonsajpoto estis sekreta familia tombeto. La fingrorito fortigis la ligon de la familio, kaj bone funkciis por integrigi bonsajojn en ĝin. Laŭ mia onklo, homoj kaj bonsajoj prizorgas unu la alian kiel familianoj ligitaj per fingroj. Sed ĉu vere bonsajoj mem deziras la fingron de mortintoj? Ne eblas! Ĉu la familio nur ekspluatas bonsajojn? Se jes, daŭris narako por bonsajoj, dum homoj ĝuis paradizon, ĉu?

En nia infaneco, mia onklo rakontis pri mistera potenco de arboj. En librobutikoj ni, gefratoj, ĉiam deziris iri al necesejo. Tiufoje la onklo diris:

"Estas tute normale voli iri al necesejo en librobutiko, kie estas multaj libroj. Arboj, nekapablaj moviĝi mem, volas ke bestoj faligu nutran fekaĵon ĉirkaŭ ili. Ili uzas ian potencon por stimuli fekadon. Tiamaniere ili regas eĉ homojn. Papero farita el arboj ankoraŭ konservas la potencon. Jen la kialo ke vi emas feki tie." Lia parolo tre impresis nin. La onklo aldonis:

"Interalie, pli mirindan potencon havas niaj bonsajoj." Nur nun mi komprenis, kion li sugestis.

Vespero alproksimiĝis. Du bonsajarbetoj iom post iom velkis pro sekiĝo de siaj nudaj radikoj. Kion fari? Aŭdiĝis stranga voĉo. "Mi longe atendis vin. Elkonduku nin aliloken kiel vi iam promesis." Mi rekonis tiun voĉon. La voĉo daŭris. "Vi, gefratoj, iam fingropromesis apud mi. *'Ni forlasu ĉi tien kaj ekvojaĝu en aventuron'*, vi diris. Mi enviis vin, ĉar mi volis aliĝi al la promeso. Mi longe suferis enfermita en bonsajpoto. Tiam mia voĉo ne atingis vin. Sed mi finfine sukcesis eniri en vian sonĝon kaj multfoje petis, ke vi forprenu min el ĉi tie. Vi promesis tie liberigi min. Ĉu vi ne memoras?"

"Jes... Sed mi timis vin kiel inkubon. Mi tiom timis, ke mi promesis helpi vin sen scii, kiu estas vi. Miajn mezlernejajn tagojn, mi timis nokte endormiĝi ĉar io neklarigebla atakis min. Mi estis implikita kun io mistera kaj aŭdis iun ekkrii pro sufero. Mi sentis min mem nenormala. Mi ne povis konsulti kun iu ajn pri mia inkubsonĝo. Baldaŭ mi forlasis ĉi tiun urbon. Ekde tiam mi havis nenian koŝmaron. Sed via voĉo tuj rememorigis min pri tiuj malfacilaj noktoj. La mistera estaĵo estis vi. Vi volis saviĝi el la doloriga sorto. Por tio, vi aperis en mian sonĝon. Delonga enigmo solviĝis. Nun estas la ŝanco realigi nian promeson, kvankam ne eblas la perditan tempon reakiri."

Haste mi metis bonsajarbetojn en aŭton kaj ekveturis por ke la radikoj ne pli sekiĝu. Tuj kiam mi trovis la aŭtovojon, mi eniris la enirejon por atingi la plej malproksiman lokon antaŭ sunsubiro. La vojo direktiĝis okcidenten. Postirante la grandan sunon, mi pripensis mian patron. Kial li silentis pri la tradicio? Ĉu li intencis liberigi nin de la malnova promeso? Certe jes. En la momento mi eksciis ke ni survojas al liberiĝo. Monto Fuĵi proksimiĝis. Mi malsupreniris la aŭtovojon kaj laŭiris ŝtatvojon. Mi stiris al senhoma vojeto, kiu kondukas al altaĵo. Fine, mi trovis taŭgan lokon por planti la arbetojn. Ĝi estis malvasta terpeco sur monteto. Mi fosis tie du kavojn. Kiam mi provis enterigi la pinarbeton en la kavon, la radikoj ekvolviĝis ĉirkaŭ mian etfingron.

"Mi nun revenigas vin al la naturo. Revenu al via vera memo el la formo trudita de ni homoj. Facile imageblas, ke vi grandiĝos ĝis homoj suprenrigardos al vi. Mi esperas, ke vi uzos vian potencon por nia planedo, ĉar ni ambaŭ estas vivaĵoj sur la Tero. Ĉi tio estas nia nova promeso. Ni promesu tion." La arbetoj respondis nenion. Tamen iliaj radikoj ĉirkaŭvolviĝis je mia varma etfingro tiel forte, ke ĝi doloretis. Sentante ilian volon, mi fingropromesis kun ili. Iliajn radikojn delikate mi malligis, kovris per teraĵo kaj sufiĉe akvumis. La morto de la patro tiel liberigis nin. Nun lia animo ekvojaĝu trankvile, kaj la familiaj rilatoj disŝiritaj pro la sekreto restartiĝu espereble. La arbetoj vigliĝis ensorbante akvon per siaj sekaj radikoj. Tio tre trankviligis min. Mi dankeme adiaŭis ilin, kiuj tiom longe servis nian familion.

En aŭtuna vespero, la luno observis la okazaĵon, prilumante ilin.

Ŝi lasis la arbetojn kaj forveturis. Sed ŝi ankoraŭ ne rimarkis la potencon donacitan de la arbetoj tra sia etfingro.

La arbetoj palpis la teron per siaj radikoj kaj la brizon per siaj folioj. Ili baldaŭ provis la lunlumon ŝanĝi en balzamon.

En la kvieta monto, venteto milde vekis arbojn el la dormo. Arbofolioj eksusuris. La zefiro daŭre blovas de la altaĵo, kie homo kaj arbetoj faris etfingropromeson.

Akiko Ĵin

Mozaiko 1

Mi komencis mian vojaĝon la 24-an de majo kaj kolektis por vi la unuajn ses respondojn de survoje renkontitaj homoj pri iliaj: (1) identeco, (2) espero, (3) mesaĝo al la mondo kaj (4) kultura rekomendo. Detaloj de la projekto troviĝas en la retpaĝo esperantulo.net/pri-vi

KONRAD'

Mia esperantista amiko kaj unua gastiganto dum la vojaĝo. Fotita sur la fama strato Piotrkowska de la urbo Lodzo, en centra Pollando, apud kiu li loĝas.

1. Tion mi penas nun remalkovri. Laŭ eduko muzikisto, ŝatokupoj: ensembl-kantado, sportumado – precipe volejbalo – kaj vojaĝoj. Ĝenerale ulo rimarkema, komprenema, helpema.

2. Fido, ke io, kion oni deziras, realiĝos. Mi plej esperas je rebonfartiĝo kaj trankvilo.

3. Pacon, pacon, pacon!

4. Ĉar mi ŝatas muzikon – inter multaj aliaj ĝenroj – ĵazan kaj elektran, mi kunhavigu kun vi mian lastatempan malkovron, kombinaĵon de tiuj du. Aŭskultu la albumon *Marianna* de *Maciej Gołyźniak Trio*.

ZUZA

Neesperantista amikino, nerenkontita de multaj jaroj. Mi vizitas (kaj fotas) ŝin en ŝia apartamento en Vroclavo. Kvankam denaske pollingva, ŝi respondis al la demandoj angle, ĉar ŝi profesie instruas la anglan kaj diras ke la angla estas por ŝi lingvo por esprimi amon kaj aliajn gravajn aferojn.

1. Mi estas persono plena de amo, sed kiu travivis multan doloron kaj neglekton. Mi estas batalanto, kiu travivis inferon kaj tamen sukcesis konservi sian brilon. Mi zorgas profunde kaj amas arde.

2. Mi trovas esperon sciante, ke kiam la estonteco venos, la signifo de kio ajn okazis en la pasinteco fariĝos duaranga. Kaj ke unu malĝusta paŝo ne signifas, ke oni ne povas marŝi plu. Kaj ke gravas la longperspektiva, granda bildo.

3. Mi volas diri al la mondo, ke ĉio, kion ni bezonas por senti nin pace kaj feliĉe, estas ĝuste tie ĉi, ĉirkaŭ ni aŭ en ni, kaj ĝi estas fakte facile atingebla, sed ni iris en malĝustaj direktoj kaj blindiĝis per nenecesaj ekstraĵoj. Oni vendis al ni falsajn instrukciojn, kiuj ne kondukas nin al ĝojo, sed al produktoj, kiuj povas nur prosperi per nia ĝojo, tial ili elsuĉas ĝin el ni. Sed ne estis eĉ plano malantaŭ tio, eĉ ne estis celo misgvidi nin... ĝi estas nur kromefiko de vivpromesa provo gajni monon – por pluvivi. Ĉu vi komprenas, kion mi provas diri? Mi provas diri, ke vi memoru pri bona dormo, fizika aktiveco, memoru ĉirkaŭi vin per beleco, pasigi kvalitan tempon kun la homoj, kiujn vi amas kaj fidas, ĉeesti plene, nutri vin sane, konektiĝi kun vi mem.

Vi ne bezonas sociajn retojn, vi ne bezonas mil novajn vestaĵojn, luksajn feriojn, nutrajn suplementojn, botokson ktp. Vi jam posedas ĉiujn rimedojn por krei kaj vivi plenumitan vivon. Koncentriĝu sur la kerno.

4. Muzikaĵo: *Walc Barbary* ("Valso de Barbara") de *Orkiestra Kameralna Progress*. Mi estas fekdamna romantikulo kaj mi trovas ĉi tiun melodion profunde kortuŝa :D

SONIA

Esperantista amikino, renkontita survoje dum la Poliglota Kunveno en la ĉeha urbo Burno. Fotita kun granda ĉokolado Toblerone, mendita speciale fare de svisaj poliglotoj por la trinkomanĝa nokto.

1. Esperantistino!

2. Espero donas fortojn – foje al mi mankantajn. Mi ĉerpas ĝin de momentoj, kiuj klare montras ke kunestado kaj kunagado eblas, indas kaj vere funkcias – de etoso, kiun mi ĝuas.

3. Ni strebu subteni kaj kuraĝigi unu la alian, esti empatiaj – eĉ se estas multe pli simple fari nenion. Se vi fortas kaj kapablas helpi, zorgi, atenti – faru tion. Kiam vi mem bezonos subtenon, iu same helpos al vi.

4. Mi ŝatus rekomendi tri aferojn, kvankam neniu el ili devenas de mia propra kulturo:

- libron: parolante pri kuraĝigo kaj subteno, mi rekomendas la libron *Leteroj al Theo* de Vincent van Gogh. Ĝi estas kolekto de leteroj, kiujn Vincent sendis al sia frato Theo, kaj kiuj poste estis kolektitaj kaj eldonitaj dank' al la

edzino de Theo, Johanna. Krom pri la ĉiutagaĵoj de Vincent (ja interesaj), ni ekscias kian rilaton li havis kun la frato, kaj kiel grava povas esti tia interhoma subteno.

- manĝaĵon: Lobio estas kartvela plado farita de fazeoloj, ajlo, freŝa koriandro kaj aliaj ingrediencoj. Ekzistas pluraj versioj, multaj el ili facilaj por prepari – kaj tre bongustaj.

- muzikon: albumo *Grow* de la bando Chon (alirebla en popularaj muzikservoj).

VÍT

Esperantista amiko kaj gastiganto en Prago, edzo de Veronika. Fotita en kuirejo de ilia apartamento, tagon post lia naskiĝtago.

4. Mi ŝatus komenci per la lasta demando. Mi ĝenerale tre ŝatas verkojn de Karel Čapek, specife la *Blankan malsanon* mi pleje ŝatas. Mi ekŝatis ĝin jam antaŭ jaroj kaj ĝi iĝas pli kaj pli aktuala kaj trafa.

3. Mi volus diri al la mondo, ke ĝi lernu de *Blanka malsano* kaj de aliaj verkoj de Karel Čapek.

2. Mi esperas, ke samkiel Václav Havel diris, vero kaj amo gajnos super mensogo kaj malamo. Mi esperas, ke ĝentileco daŭre valoras. Mi esperas, ke interkompreno daŭre eblas.

1. Mi estas iu, kiu klopodas sekvi miajn esperojn kaj esplori ĉion. Kaj se eblas, mi tre ŝatas ŝerci pri ĉio.

VERONIKA

La edzino de Vit. Antaŭ jaroj ŝi estis estraranino de TEJO kaj mia superulo dum mia volontulado; nun ŝi estas mia amikino kaj gastigantino. Fotita kun sia hundino Luna.

1. Mi estas sufiĉe privata persono, mi preferas ke homoj ekkonu min tra babiladoj kaj persona kontakto ol per iu publika sinprezento.

2. Mi esperas, ke homoj, averaĝe, estas bonaj. Ili donas al mi esperon, kiam mi vidas ekzemplojn de tio.

3. Vivu kaj lasu vivi. La mondo estus tiom pli agrabla loko, se ĉiuj agus laŭ tiu ĉi simpla principo.

4. Kiel kulturaĵo mi ŝatus rekomendi tutan ĝenron: operojn. Homoj, ĉefe de nia generacio, ofte reagas kun miro kiam mi mencias ke mi ŝatas ilin, kvankam temas pri ege kompleksa aŭdvida formo de arto, kiu ofte postulas pli ol 100 homojn por prezenti kaj testas la limojn de homaj kapabloj. Dank' al ĝia 400-jara historio ĝi estas ankaŭ ege varia, kaj muzike kaj rakonte. Ĝuste pro tio mi ankaŭ rekomendas doni almenaŭ kelkajn ŝancojn al la ĝenro, antaŭ ol decidi ĉu ĝi estas por vi aŭ ne. Pri konkretaj pecoj, certe spektindas la (laŭ mia scio) ununura opero en Esperanto, Sternenhoch de Ivan Acher, kaj mia plej ŝatata ĉeĥa opero *Jenůfa* (*Její Pastorkyňa*) de Leoš Janáček.

PETRO

Mi ricevis lian kontakteblecon de Veronika. Mi ekkonis lin en Budapeŝto, kie li gastigis min en studenthejmo, en kiu li loĝas kun sia koramikino kaj kie li estis fotita.

1. Mi estas Petro, hungara esperantisto, psiĥologo kaj iama (eble estonta) instruisto de fremdaj lingvoj. Mi estas scivolema homo, kiu volas kompreni aferojn. Mi ofte analizas kaj kritikas la mondon el vidpunktoj de psiĥologio, sociologio aŭ lingvistiko. Foje mi eĉ sukcesas solvi problemojn tiel. Por mi humuro, amikeco kaj muziko estas ege gravaj, eĉ mi mem verkas kantojn.

2. Laŭ mia kompreno espero estas kredo, kiu donas al ni energion daŭri aferojn. Mi esperas, ke la mondo forlasas la vojon laŭ kio ĝi nun iras. Ĉio pliboniĝos kaj ni povos vivi en pli amika kaj multe pli daŭripova mondo.

3. Kiel ĝeneralaj mesaĝoj mi ĉiam diras la samajn: "Homoj estas pli valoraj ol mono. Amikeco kostas nenion, sed plibonigas ĉion." Tiuj rilatas al la mesaĝo, kion mi volas sendi pri mi. Mi deziras esti interesa homo, kun kiu estas bone esti kune, kaj kies pensojn indas aŭskulti.

4. Mi rekomendas la muzikon de la hungara rokmuzik-grupo *Hungária*, ĉefe ilian duan albumon *Tűzveszélyes* ("Fajr-riska" aŭ "Fajr-danĝera") de la jaro 1971.

Ulo de Esperantujo

La papusoj de la poploj

Foto de la aŭtoro. Parko de la Vernavola*, aprilo 2020.*

Mia unua fojo okazis en Pavia, tre ĉarma urbo en la itala regiono Lombardio. La loko nomiĝas "Parko de la *Vernavola*" sed, malgraŭ la nomo, ĝi pli similas al arbaro ol al bosko. Ne malofte oni renkontas fazanojn, vulpojn kaj kojpojn, kiuj vivas tie tute preteratentante sporadajn vizitantojn de tempo al tempo alŝteliĝantajn en la makison, kiaj ni estis.

Tiu ĉi rakonto komenciĝas la 25-an de majo, sed la vetero tiam apenaŭ aspektis printempa. La suno komencis maldensigi la ĉiutagan nebulon de la Pada ebenaĵo nur kelkajn tagojn antaŭe, tiel ke la aero restis ankoraŭ sufiĉe humida kaj friska. La parko en si mem estas facile atingebla, sed malfacilas trovi apartigitan lokon, for de maldiskretaj okuloj.

"Mi nomas ĝin *Terabithia*", ri diris, "ĉar ni devos transiri ponton". "Ĉu vi jam estis tie?" "Jes, por elekti la lokon. Vi ŝatos ĝin". Ni alvenis al la ponto, kiu poste montriĝis simpla trunko super torento, ĉirkaŭ kvin metrojn longa, ŝajne ne tro solida; ĉar kio okazos poste postulos de mi multe pli da kuraĝo ol akrobati sur putranta ligno, mi aŭdacis alpaŝi kiel unua kaj, atinginte la alian bordon, mi turniĝis kontenta ŝajnigante fieron pro la heroaĵo.

Ekde kiam mi estas infano, mi ĉiam pensis ke iam ĝi okazos, nur ke mi ne scias kiam. Kaj tiu tago, la 20-a de majo, estis *la* tago. Mi memoras ke kiam mi havis malpli ol dek jarojn mi spektis filmon pri tio, poste la filmoj iĝis pluraj, televidserioj, dokumentaj filmoj, libroj. Oni povas diri ke mi preparis min por tiu momento, sed kiel eblas esti preta por la vivo?

"Ĉu vi certas ke ni iras laŭ la ĝusta direkto? Ĉi tiu ne ŝajnas tretata vojo". "Ne mankas multo". Kaj ne mankis, efektive. Kelkajn metrojn poste ni aliris senarbejon kie koncentriĝis la falantaj papusoj de la ĉirkaŭaj poploj, kovrante la grundon kvazaŭ neĝo.

"La tago ĵus komenciĝis. Konsciu ke ni havas nur Spartajn rimedojn: iom da akvo, granda tolaĵo, laŭtparolilo". "Ĉu ne ion por manĝi?" "Manĝaĵetojn, sed estus preferinde manĝi nur poste, ne dume; kaj aldone mi portis valerianon, okaze ke vi iĝos nervoza". Mi ne estis nervoza; certe, ĝi estis mia unua fojo, sed mian korpon animis nur la entuziasmo.

Mi atente observis la fungojn, ili aspektis bluecaj, mi sciis ke tiu bluo estas la molekulo respondeca pri la postaj ok horoj.

Maĉado, englutado, starto.

La 13-an de januaro 2006, en Bazelo (Svislando), okazis internacia simpozio pri LSD (dietilamido de la lizerga acido) omaĝe al la centjariĝo de ĝia malkovrinto, Albert Hofmann[1], kiu interalie ĉeestis kaj kontribuis al la programo. Pli-malpli dum tiuj jaroj tradicie komenciĝis tio kion la fakuloj nomas "psikedelisma renesanco", ĉirkaŭ dek jarojn poste kulminonta per neŭrobildaĵoj de cerboj sorbintaj respektive psilocibinon kaj LSD-on, prezentitaj de Robin Carhart-Harris[2], kiu emfazis la neatendite intensajn konektojn tie okazantajn. Tio portis David J. Nutt[3] deklari: "Oni

Fonto: https://media.istockphoto.com

1 Albert Hofmann (1906-2008) estis svisa kemiisto konata pro la malkovro de la dietilamido de la liserga acido (LSD). La 16-an de aprilo 1943, Hofmann hazarde ekspertis la psikedelajn efikojn de LSD dum bicikla hejmeniro, hazarde ensorbinte dozon dum laboratoria eksperimento horon antaŭe. Hofmann havis profundan intereson pri la spiritaj kaj mistikaj aspektoj de la psikedelaj spertoj. Li daŭre uzis LSD-on dum sia vivo, lastfoje aĝante 97 jarojn. Hofmann estas konsiderata unu el la plej influaj sciencistoj de la 20-a jarcento. Lia malkovro de LSD havis profundan efikon sur kulturon kaj sciencon.

2 Robin Carhart-Harris (1980) estas brita psikofarmakologo kaj neŭrosciencisto, ĉefe konata pro sia pionira laboro en la kampo de psikedelaj esploroj, precipe pri la terapia potencialo de psikedelaj drogoj kiel LSD, psilocibino, MDMA kaj DMT. En 2020, *The Times* nomis lin unu el la tridek unu plej gravaj medicinaj sciencistoj en la mondo. La sekvan jaron, li estis inkluzivita en la liston "100 Next" de la revuo *TIME* kiel unu el la cent plej rimarkindaj personoj "pretaj ŝanĝi la historion".

3 David John Nutt (1951) estas brita neŭropsikofarmakologo specialiĝinta en esploroj pri drogoj kiuj influas la cerbon kaj kondiĉoj

ĵus malkovris la Higgs-bosonon de neŭroscienco".

Kio estas LSD kaj psilocibino? Tiuj substancoj estas konataj ankaŭ per la nomo "psikedelaĵoj". Kelkaj estas de ĉiuj tre konataj, kiel LSD mem aŭ meskalino (el kaktoj kiel pejotlo, San-Pedro k.s.); aliaj malpli: psilocibino (aŭ, pli precize, psilocino, enhavata de halucinogenaj fungoj apartenantaj al la specioj *Psilocybe, Panæolus, Inocybe* kaj *Stropharia*), DMT (dimetiltriptamino, trovebla en kelkaj plantoj, en la ŝvito de bufo *Incilius alvarius* kaj en la mjelo de *Homo sapiens*), LSA (amido de la lizerga acido) kaj aliaj.

La vorto "psikedela" havas grekan etimologion: ψυχή "psiko" kaj δηλόω "elmontri", nome "tio kio elmontras la psikon". Efektive, la efiko de psikedelaĵo estas ĉefe surtabligi kaj klarigi la enhavon de la propra konscienco. Ofte tiu vorto alprenas la signifon de "halucinogena", sed halucinoj (je pure perceptaj niveloj) estas nur parto de la riĉeco de la psikedela sperto.

La homa cerbo disponas je hierarkiigita kontrolsistemo, nomata *Default Mode Network* (DMN – "defaŭltmoda reto"), kies tasko estas organizi kaj ordigi la impulsojn kaj stimulojn kiujn ni daŭre ricevas elekstere. La ĉefa funkcio de DMN, simple dirite, estas helpi nin vivi trankvile, respondante per aŭtomatismoj al la senlima kvanto de informoj kiuj nin ĉiutage alpafas. Kiam ni prenas psilocibinon aŭ LSD-on, tiu ĉi reto kolapsas dum certa tempo, estigante staton de nekutima entropio en nia cerbo; ne kapabla helpi sin per la aŭtomatismoj de la ĉiutaga vivo, la cerbo devas tial krei novajn neŭronajn konektojn, kiuj plu daŭras post la fino de la psikedela sperto kaj la reaktiviĝo de DMN. La kulturaj, sociaj, psikologiaj kaj spiritaj eblaj rezultoj de tiu ĉi cerba superruzado estas ankoraŭ plejparte nemalkovritaj, ĉar la ĝisnunaj esploroj estas tre limigitaj de la kontraŭdrogaj politikoj de la landoj.

Ekzemplero de Incilius alvarius*, kiu distingiĝas de aliaj bufoj pro sia kapablo produkti grandajn kvantojn de 5-MeO-DMT, unu el la plej potencaj psikedelaj substancoj. Fonto: https://staticgeopop.akamaized.net/*

Estas plu neniu formo de konscio pri mi en la pasinteco, neniu memoro pri mia infanaĝo, nenio krom la maniero laŭ kiu, en ĉi tiu momento, mi identigas min mem kaj la mondon ĉirkaŭ mi en la matrico de mia Mio. Fandiĝinte la Mio, tio kio restas estas terura demando: kiu mi estas *vere*? Kaj post tio alia, des pli terura demando: ĉu mi *vere* estas?

Mi kuŝis sur tolaĵo mola pro la blankaj surteraj papusoj, rigardante la branĉojn super mi, apenaŭ fleksiĝantajn pro la facila vento perfekte harmonianta al la unua movimento de la *Germana Rekviemo* de Brahms, kies melodion elkantis la laŭtparolilo.

La uzantoj de tiuj substancoj spertas komunan senton, pli aŭ mapli intensan, depende de la prenita dozo: la korkreviga nudeco de nia animo fronte al ĥaoso. La utileco de psikedelaĵoj ne tiom kuŝas en tio, ke ili proponas respondojn, sed en la levado de novaj neatenditaj demandoj, malfermante la vojon al ne sufiĉe esplorita teritorio, t.e. la profundaj kaj misteraj abismoj de la homa psiko.

Laŭ la esploroj de Carhart-Harris, psikedelaĵoj, specife triptaminoj (kiel LSD, psilocibino, DMT, LSA), havas la jenajn efikojn sur la homan cerbon: 1) ili malpliigas la sangan alporton al la amigdalo, kiu okupiĝas, interalie, pri la procezado de timo, kolero kaj anksio, igante ĝin malpli aktiva; 2) ili blokas DMN-on. Tiu lasta trajto valoras precipe konsidere al la fakto ke deprimitajn homojn karakterizas hiperaktiva DMN, kiu kondukas al spiralo de negativaj kaj ripetiĝantaj pensoj kiujn malfacilas eskapi. La inhibicio de DMN tiel permesas malaktivigi dumtempe la elŝaltitan menson, kiu aŭtomate reaktiviĝas post kelkaj horoj. La adjektivo ne estas hazarda; homoj kiuj partoprenis la eksperimentojn de Carhart-Harris konceptis sian cerbon kiel elŝaltitan komputilon kiu, reŝaltiĝinte, rekomencis sian normalan funkciadon.[4] DMN muldas la ĉiutagan sperton pri ni, konstruas nian identecon kaj organizas ĉiujn agojn je socia nivelo.

kiel dependeco, anksio kaj dormo. Ĉefe konata pro sia pionira laboro en la kampo de psikofarmakologio kaj pro siaj kontestaj pozicioj pri drogopolitiko. Prezidanto de *Advisory Council on the Misuse of Drugs* (ACMD) ĝis 2009, kiam li estis maldungita pro malkonsentoj kun la brita registaro pri drogopolitiko. Konsekvence, li fondis *Independent Scientific Committee on Drugs*, nun konatan kiel *Drug Science*.

4 Resumo pri la ĉefaj esploroj ĝis la komenco de nia jardeko legeblas ĉe David J. Nutt, Robin Carhart-Harris (2021), *The Current Status of Psychedelics in Psychiatry*, "JAMA Psychiatry", 78/2: 121-122.

Albert Hoffman, hejmeniranta bicikle. Fonto: https://www.gratefulweb.com

Kiu estis tiu "mi", kapabla observi la scenejon en kiu okazas la propra dissolviĝo? Bona demando. Ne estis *vere* mi. Por funde kompreni la diferencon kiu estiĝas inter *mi* kaj la subjekto de *mia* perspektivo dum psikedelaj spertoj, mi sentas la bezonon havi novan unuapersonan pronomon. Mi hezitas uzi la pronomon "mi", ĉar tio kio mi estis ĝis tiam, tiu persono kies konstruo postulis dudek tri jarojn da vivo, simple malaperis, forlasis la scenejon.

Restis nur **, la papusoj kaj la poploj.

Kulturaj antaŭjuĝoj profunde enradikiĝintaj en nia socio klarigas kial nia menso subite anksiiĝas kiam oni parolas pri "drogoj". La psikaj ŝanĝoj de ili estigataj elmontras tre klare kiom multe nia mensa vivo gardas siajn radikojn en nia korpo, en la materio. La drogoj, ĉiuj drogoj, defias la kristanan supozon pri la netuŝebleco kaj speciala ontologia statuso de la homa animo; same, ili defias niajn egoojn kaj ĝiajn kontrolemajn pretendojn. Resume, ajna sperto kun psikedela planto krizigas la tutan mondan vizion pri kulturo bazita sur regado.

En 2007 la du plej gravaj geniuloj de la homaro[5] laŭ Telegraph estis Tim Berners-Lee (kreinto de World Wide Web) kaj Albert Hoffmann (malkovrinto de LSD kaj pioniro de la psikedelisma renesanco). Tiel mi konkludas mian mallongan kontribuon pri psikedelaĵoj, per citaĵo el la ĉefa verko de Hoffman, LSD. *Mia malfacila infano*:

Kiu estas la fundamenta kaj karakteriza diferenco inter la normala realo kaj la mondbildo spertata dum la ebriiĝo per LSD? En la normalaj statoj de konscio, la Mio kaj la ekstera medio estas apartaj; la subjekto staras antaŭ la mondo, kiu iĝas objekto. Per LSD la limoj inter la Mio konanta kaj tio, kio staras vidalvide min, pli-malpli vanuiĝas, depende de la intenseco de la ebriiĝo. [...] Parto de la Mio elrompas en la eksteran mondon, en la kozojn, kiuj per ĝi animiĝas kaj akiras signifon diversan, pli profundan. Tiu sperto povas esti ekstaza aŭ alpreni la demonajn trajtojn de pura teruro. En ambaŭ okazoj, ofte je la daŭro de unu sola eterna momento, oni perceptas la dimension el kiu radias la lumo de la transmonda realo.

Alessio Giordano
Svislando/Italio

5 *https://www.telegraph.co.uk/news/uknews/1567544/Top-100-living-geniuses.html*

Tiel la mondo… bruas

Mi sidas en la ĉefĉambro de Barcelona apartamento sabate noktomeze, kun vido al mallumaj arbokronoj. Antaŭ kelkaj horoj aŭdiĝis persista fandango el ternivela teraso – nun iom malpli laŭte, sed multvoĉe, plurgeneracie bruas festemaj familioj. Fojfoje mi aŭdas tamen ankaŭ petegan beboploron el najbara dormĉambro: mi ja venis al Katalunio por konatiĝi kun mia dua nepo, nur tri semajnojn aĝa.

Kiam naskiĝis mia fratino, la mondo bruis pri Woodstock, pri Stonewall, pri la unua homa surluniĝo. Nian hejmon bruoj envenis tra radio, televido, fiksa telefono. Aliaj tempoj. Nun la mondo bruas pri kaj pro… nu, mi povus nomi konkretajn militojn kaj fortvoĉajn landestrojn kiel aktualajn brukreilojn. Sed ni vivas en esence malsama bru-mondo ol antaŭ duonjarcento: ĉiu el ni en propra bru-bobelo, kun bruoj muzikaj el poŝtelefonoj, kun novaĵaj bruoj samfontaj. Homo de antaŭ jarcento timsaltus pro telefonaj voksignaloj por ni tute kutimaj. Homo de eĉ pli frue opinius infero la aŭto-sonegojn de niaj metropoloj. La novaĵajn bruojn de la nuno ili tamen trovus pli rekoneblaj, ĉar la homa naturo pluas sama, instigante agojn esence samajn.

Kiu, kiel bruos al mia nepo post plia kvindeko da jaroj? Ĉu tiamajn muzikojn mi trovus nur bruo? Ĉu la bruojn de lia ĉiutago mi scius interpreti? Ĉu vortojn por li kutimajn mi komprenus?

Hodiaŭ mia nepo kaj mi bruis unu al la alia. Li perbuŝe protestis por pli da lakto, kaj inteste gargaris la ricevitaĵon. Ĉe ŝanĝo de vindotuko, gracia pis-radio eĉ ŝpruc-sonis sur la banĉambra planko. Mi mem bruis al li uzante mian sonaparaton kiel amplifilon de mia koro.

István Ertl



Krucvortenigmo



Vi povas trovi retan version de la krucvortenigmo ĉi tie:

http://verkoj.com/html/kontakto/

HORIZONTALE→

1. Lango miela, sed ... kruela (Zamenhof)
5. Kulturata kampo
9. Ege honori, havi pasian emon
11. Imago de feliĉigaj, deziratai aferoj (*)
12. Varmiĝis ĝis svarma formiĝo de vaporbobeloj
13. Komenco
14. Alkoholo kiu estas uzata kiel anstataŭaĵo por benzino por pelado de veturiloj (*)
16. Kia ...o, tia re...o (Zamenhof)
18.Ĉiu sezono kun sia ...o (Zamenhof)
19. Politika grupo, kies anoj luktas por komuna celo
22. Akvomaso, kiu leviĝas kaj refalas ĉe supraĵo de akvo (*)
23. Tiu, kiu tre ŝatas (*)
26. Tre
27. Mensoganto devas havi bonan ...on (Zamenhof)
28. Muzika sono
29. Signi ion per distinga vorto

VERTIKALE ↓

1. Ŝnurego el vegetaĵaj aŭ metalaj fibroj (*)
2. Festasolena poezio
3. Ĉiu parto de teatra verko, ludata de ĉiu aparta aktoro (*)
4. La suno ĉiam leviĝas en la ...o
6. Kia ..., tia pano (Zamenhof)
7. Agnosko (*)
8. Fekundigebla inseksa ĉelo, produktata de ovario (*)
10. Esperanta sufikso
15. Ĉiu ...aĵo trovas sian adoranton (Zamenhof)
16. Maldolĉa por la lango, sed saniga por la ... (Zamenhof)
17. Societo, kiu akceptas kiel membrojn meritplenajn personojn (*)
19. Verkisto de poezio (*)
20. Ankaŭ al nia nesto venos ... la festo (Zamenhof)
21. Linio kiu diferencas laŭ koloro disde la apuda areo (*)
24. ... pli kora, disiĝo pli dolora (Zamenhof)
25. Kia la homo, tia lia ...o (Zamenhof)

La signo (*) montras, ke en la solvo mankas la fina "O" de **substantivo**. Ekzemple: anstataŭ *POMO* skribu *POM*.

U kaj Ŭ estas interŝanĝeblaj literoj en la krucvortenigmo.

Kelkaj frazoj en ĉi tiu enigmo estas el la *Proverbaro* de Zamenhof. Se vi bezonas helpon, rigardu ĉe: *https://www.proverbaro.net/*

SOLVO DE LA ANTAŬA KRUCVORTENIGMO

V	A	R	O		A	K	R	A
A	G	E	N	D		R	E	K
K	O	P	I	I		U	Z	I
S			D	O	K	T	O	R
	A	M	I		L	A	N	
E	N	O	R	M	A			F
M	I	T		A	K	I	R	I
A	M	O		R	A	D	O	M
S	O	R	T		S	O	L	O

Eventa foto je solena fermo

Junulara Renkontiĝo de Brazila Nordoriento

Kaj konsideroj pri la junulara movado de Brazilo

Antaŭ kelkaj monatoj okazis la dua plej konata evento de brazila Esperantujo: Junulara Renkontiĝo de Nordoriento (JRN), kiu okazas kune kun Nordorienta Esperanto-Renkontiĝo (NER).

Tiu evento estas aparte interesa por mi. Temas pri regiona evento de granda lando, kiu okazas –malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj– ĉiujare. Dum plejparto de ĝia historio, ĝi okazis ĉiam en la sama urbo: Kampinagrando, en la ŝtato Paraibo. Sed ekde pasintjare, ĝi adoptis la kutimon elekti novan urbon ĉiujare. En 2024, ĝi okazis en Recifo, en la ŝtato Pernambuko, kaj en aprilo de 2025 en Natalo, en la ŝtato Nordariogrando[1].

La eventon mi taksas interesa ne pro la ŝanĝo de urboj, tamen, ĉar tiu kutimo certe ne estas surprizo en Esperantujo. Kio interesas min estas ĝia eco: junulara evento, kiu okazas kune kun ne-junulara evento. Kial?

Laŭ mia perspektivo la plej mondfamaj eventoj de Esperantujo estas tiuj eŭropaj. Kaj la eŭropa kunteksto povas esti tute malsama al aliaj mondpartoj. Oftas en eŭropa Esperantujo la junularaj eventoj, kiuj okazas memstare; sed en Brazilo, tute male. La plej granda esperantista evento de Brazilo estas nia nacia kongreso. Ĝi ankaŭ havas duoblan econ: ĉiujare okazas kune Brazila Esperantista Junulara Kongreso (BEJK) kaj Brazila Kongreso de Esperanto (BKE).

Kompreni la kialon de tio estas facile: malfacilegas okazigi ĉiujaran eventon, kaj se la homforto de brazilaj aktivuloj disiĝas, la tasko neeblas. Ironie, la ekzisto mem de tiu evento substrekas tion. Ni komprenu: Brazilo estas grandega, tial la emo krei regionan eventon aperis. Simple ne sufiĉis "dependi" de la ununura nacia kongreso. Do abundas la etaj lokaj eventoj. Pernambuko havis dum 10 eldonoj sian ŝtatan simpozion; Sanpaŭlo daŭre havas sian ĉiujaran ŝtatan kongreson; ktp. Do nordorientanoj ne prokrastis unuiĝi kaj krei regionan eventon, kiu por pluraj estas alternativoj al la na-

1 Nomoj de lokoj portugalalingve, respektive: *Campina Grande, Paraíba; Recife, Pernambuco; Natal, Rio Grande do Norte*.

Paroladoj dum solena malfermo

cia kongreso[2] (kiam ĝi, ekzemple, okazas en tro fora urbo).

La regiona renkontiĝo de Nordoriento servas ankaŭ kiel varbilo por la nacia kongreso! Ne maloftas, ke oni parolas pri la temo de la nacia kongreso, prezentas la urbon kaj instigas homojn aliĝi tuj. Do jen la situacio de nordorientaj esperantistoj: havantaj du eventojn, kun la pli eta servanta al la pli granda, ĉu kiel alternativo, ĉu kiel pretigo.

Kaj en la mezo de ĉio tio, kie estas la junularo? La strebo necesa por okazigi ambaŭ eventojn estas ega kaj la homforto por okazigi apartan junularan eventon bedaŭrinde ne estas.

Tiu realo kunportas la zorgon, ke la tiel nomataj "junularaj" eventoj de Brazilo ne estas vere... *junulecaj*. Malfacilas ĵongli programerojn tiel ke la programo estu junula; plurfoje oni povas senti, ke okazas "batalo" inter la junula kaj ne-junula programo. De tio kreiĝas speco de kulturo: komuna loĝejo estas ĉiam ege dezirata kaj la elirumadoj noktaj estas granda parto de la sperto ĉeesti tiujn eventojn por la junuloj.

Mi ne celas diri, ke tio estas malbona afero, tamen. Tute male: la sperto ĝui la urbon nokte, inter la junuloj, iusence "paralele" al la programo de la evento kiu renkontigis tiujn junulojn (dum la programo dumtage estas iom pli "serioza"), estas, laŭ mi, parto de la speciala brazila gusto de esperantaj eventoj.

Kiel brazilano, kiu povis partopreni eksterlandajn esperantajn eventojn, mi ĝojas, ke mi povas havi malsaman sperton. Por mi, tio sentiĝas kiel sperti plurajn Esperantujojn, aŭ sperti Esperantujon en pluraj manieroj.

Tio ankaŭ scivoligas min pri la kutimoj de esperantaj eventoj en aliaj mondpartoj. Kiujn apartaĵojn ili havas? Kiuj interagoj inter junulara kaj ne-junulara movadoj okazas kaj kiel tio influas la eventojn? Se vi emas kundividi vian sperton, ne hezitu kontakti min, mi ege ŝatus aŭdi vin!

Kehuo Neto, Prezidanto de Brazila E-Ligo, prezentanta teatraĵon

Ĉiuokaze, estas nekontesteble, ke tiu ĉi regiona renkontiĝo estas gravega por la daŭrigo kaj kreskigo de la junulara movado. Ni eĉ vidis la naskiĝon de nova ŝtata sekcio de Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO). La junuloj renkontiĝintaj tie kreis PEJ-on (Potigvaran Esperantistan Junularon).

Tio estas bonega surprizo, konsiderante, ke la movado en tiu ŝtato trairas malfacilan periodon. Ĝia inta asocio (Potigvara Esperanto-Asocio) trairas la procezon esti malfondita. Luana França estis ĝia prezidanto kaj gvidas tiun procezon. Ŝi estis unu el la ĉeforganizantoj de la renkontiĝo kaj mi profitas por kundividi iom de ŝia rakonto pri la historio de la asocio.

Saluton, mi estas Luana, eksprezidanto de la Potigvara Esperanto-Asocio kaj eksestrarano de TEJO. En la ĉi-jara JRN/NER, mi prizorgis la teamon pri kongresejo kaj programo.

Post du jaroj for, mi revenis al mia urbo kaj denove loĝas en Natalo, urbo en kiu mi iĝis esperantisto kaj ekmovadumis.

En 2025, ni gastigis la 26-an NER-on kaj 12-an JRN-on en la 121-jaraĝa Teatro Alberto Maranhão. La programo konsistis el debatoj, ĉefe pri la situacio de la esperanta movado en la regiono, defioj kaj planoj por estonteco. Estis junularaj programeroj kiel promenadoj ĉe plaĝoj kaj kunspekatado de la sunsubiro ĉe la rivero Potenĵio[3] kaj mi prezentis iomete pri memoraĵoj kaj historio de Esperanto en la urbo.

La Potigvara Esperanto-Asocio naskiĝis la 28-an de septembro de 1940. Dum pli ol okdek jaroj ĝi estis la ĉefa Esperanto-organizo de la ŝtato. Tra la jaroj, ĝi trapasis la diktaturan periodon de Brazilo, okazigis diversajn ĥorojn. La lasta granda evento ĉi tie estis la Brazila Kongreso de Esperanto en 1994. Kurioze, la aŭtoro de la Himno de la urbo estis Profesoro Waldson Pinheiro, honora kaj eminenta natala esperantisto. Maro kaj rivero brakumis la samideanojn dum bela semajnfino.

Ikvero
Brazilo

2 Per "nacia kongreso", la aŭtoro celas la kuniĝon de BKE kaj BEJK.

3 Portugalalingve: *Potengi*

Dum IJF 2025… …aŭ Kiel organizi esperantistan festivalon

Mallonga gvidilo de Gabriele Esposito Guido

Mi neniam partoprenis IJF-on sen organizi ĝin. En 2024, pasintjare, estis mia unua fojo, kaj mi organizis la IJF-on sen iam antaŭe ĉeesti ĝin. Kompreneble, mi ĉeestis multajn aliajn esperantistajn eventojn antaŭe, kaj finfine ĉiuj esperantistaj renkontiĝoj iel similas kaj malsamas, ĉu ne?

Organizante festivalon en Italio, oni havas malsamajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn kompare kun aliaj landoj. Ekzemple, la katalunoj povas fidi je la Nacia Reto de Sociaj Gastejoj Xanascat, dum en Germanio, tuj kiam oni foriras iomete de la grandaj urbaj centroj, ekzistas grandaj gastejoj tre bone ekipitaj, kun sufiĉe alireblaj prezoj, elpensitaj por akcepti grandajn grupojn de junuloj (ofte skoltoj) kaj plejparte konstruitaj lastatempe.

En Italio ni havas tion, kio estas ofte nomata "feridomoj"[1]. Italio, kiel oni scias, estas lando kun ekonomio koncentrita sur turismo kaj pro tio ekzistas granda kvanto de lokoj destinitaj por akcepti turistojn aŭ feriantojn serĉantajn ripozon. Tio signifas, ke la koncernaj strukturoj ofte situas en tre allogaj lokoj, sed samtempe ili havas preskaŭ jarcenton, estas malbone konektitaj per publika transporto kaj tute ne taŭgas por gastigi festivalojn kiuj bezonas ĉambrojn por prelegoj, koncertejojn, trinkejon kaj ĉion alian kion la organizado de esperantista evento postulas: do oni devas "kuspi la manikojn" kaj labori por adapti la lokon al niaj bezonoj.

Ĉi-jare la IJF okazis en Toriĉelademaĝono, belega loko en Umbrio, en la centro de Italio. En la lastaj jaroj ni sukcesis distribui la IJF-on en diversaj zonoj de la Boto, organizante ĝin en 2023 en la sudo, en Palmio en Kalabrio, en 2024 en la nordo, en Seradadefolgario, en Trentino[2], kaj en 2025 en la koro de la Bela Lando en ejo, kiu jam antaŭ 19 jaroj gastigis la eventon, kiam tamen neniu el ni organizantoj estis esperantistoj (iuj el ni tiam ĵus naskiĝis). La beleco de la loko tuj konkeris nin: granda ripozejo rekte antaŭ unu el la plej grandaj lagoj de Italio (tempo de irado de la enirejo de la festivalejo ĝis la plej proksima plaĝo: 1:36 minutoj). Tamen, tuj kiam ni alvenis, en la 24 horoj antaŭ la komenco de la festivalo, ni devis labori ne malmulte por igi la lokon taŭga por akcepti la partoprenantojn.

Por faciligi ĉion, la kara mastrumanto de la ejo, ankaŭ forgesis ke ni organizantoj alvenos tagon pli frue, kaj nia strečnivelo, jam alta, atingis nivelojn de kortizolproduktado vere grandajn. Transformi manĝejon en koncertsalonon

1 Italalingve: *casa vacanza*

2 Nomoj de lokoj italalingve, respektive: *Torricella di Magione, Boto, Palmi, Serrada de Folgaria, Trentino*.

kaj devi klarigi al la kuiristo en 2025 la diferencon inter vegetarana kaj vegana dietoj igis nin pozitive retaksi dum unu minuto la motivojn de Kazimierz Bein, sed feliĉe la 17-an de aprilo posttagmeze ĉio estis preta por akcepti niajn esperantistojn kaj de tiam ĉio iris pli kaj pli glate.

Ni tuj rimarkis entuziasmon kiu plenigis nin per energioj, malaltigante la kortizolnivelon en favoro de abundaj kvantoj de dopamino, tamen ne sufiĉaj por igi nin dormi longajn kaj dolĉajn noktojn (dum la semajno de la IJF mi kalkulis ke mi dormis entute 25 horojn, ĉirkaŭ 4 horojn nokte – ne malbone, fakte).

Dum organizado de festivalo, neatenditaĵoj vere okazas ĉiuminute, do oni devas esti fleksebla. Ekzemple, se oni eraras rigardante la horaron de la busoj por la ekskurso, oni devas esti preta reorganizi la tutan ekskurson akompanante la homojn per aŭto aŭ konvinkante ilin fari malstreĉigan kaj fascinan promenadon dum 6 kilometroj (jes, tio vere okazis) por atingi la havenon, kie oni prenis la pramon. Feliĉe, esperantistoj estas aventuremaj homoj, sed ili ankaŭ povas esti tre plendemaj, kaj la reputacio de evento estas grava poste por povi reklami ĝin. Foje, ĉi tiuj aferoj fakte igas la eventojn pli amuzaj kaj "spicaj", aŭ almenaŭ donas okazon por ŝerci pri ili. Fakte, pro historiaj kialoj, nia festivalo estis nomita en la pasinteco "Frostivalo" pro la malbona vetero kiu ofte dum la Paskaj festoj estas en Italio, sed pri nia lando oni ankaŭ diras ke dum *Pasquetta* (laŭvorte "malgranda Pasko", do la Paska lundo) estas bela vetero ĉiufoje kiam papo mortas. Kaj efektive dum la IJF la papo mortis kaj la vetero estis vere mirinda. Ĉu koincido? Eble. Sed restas la fakto ke krom kelkaj gutetoj da pluvo dum la unua tago, dum la tuta semajno la bela vetero vere faris ĉion multe pli agrabla kaj la partoprenantoj povis profiti la eksteran ĝardenon por kuŝiĝi sur la herbo, sunumi kaj eĉ endormiĝi sur la seĝoj proksime de la naĝejo.

Ricevi bonajn reagojn pri la festivalo estis por ni vere grave. La IJF-organizteamo havis antaŭ si veran defion. Antaŭ du jaroj la eventon organizis malgranda teamo kaj la malfacilaĵoj renkontitaj estis eĉ pli grandaj (la posedanto de la strukturo nuligis la kontrakton tuj antaŭ la evento kaj estis necese trovi novan lokon en tre rapidaj tempoj). Rezulto: festivalo kun perdo de kelkaj miloj da eŭroj. Pasintjare, kun pli solida teamo, la festivalorganizado funkciis pli bone: kontentaj partoprenantoj kaj ekvilibra bilanco.

Ĉi-jare eĉ pli bone: ĉiuj kontentaj kaj pozitiva bilanco: la festivalo denove kreskas kaj ni povas pensi por la venonta jaro fari ion pli grandan! La plej entuziasmiga afero estis vidi ke dum la jara asembleo de la IEJ, kiu tradicie okazas dum ĉi tiu evento, alvenis diversaj spontanaj kandidatiĝoj por fariĝi parto de la estraro de la organizo. En kelkaj jaroj ni pasis de estraro de 3 personoj al unu de 10 homoj kaj tio ne povas esti alie ol bona signo por la estonteco de la organizo.

Junularaj esperantistaj festivaloj, kvankam kun la tempo multobliĝintaj, ĝenerale tamen estas malpli partoprenataj ol antaŭ kelkaj jardekoj: inter la diversaj kaŭzoj certe estas konsiderinda la pli alta kosto pro inflacio, kiun multaj junuloj ne povas permesi al si pagi. Kvankam la partoprenofluoj oscilas, certe tamen ĉi tio nenion diras pri tio, kiom tiuj eventoj restas plene unikaj spacoj, amataj kaj vivataj kun pasio, kaj de tiuj kiuj ĉeestas ilin de longe, kaj de tiuj kiuj ĵus eniris Esperantujon. Ĉi tiuj eventoj konfirmite restas, pro sia esenco, lokoj de paco, bonvenigo, kunhavigo, batalo kontraŭ diskriminacioj, kiuj bezonas daŭre ekzisti, malgraŭ la sociaj kaj politikaj tendencoj de la lastaj jaroj irantaj en aliajn direktojn...

Por resumi, jen kion mi kaj la resto de la organizteamo ler-

nis en ĉi tiuj jaroj. Mi prezentas ĉi-sube mallongan esencan gvidliston por organizi esperantistan festivalon:

Fazo 1: Antaŭa Organizado (aŭ: Kial ni estas farantaj tion?)

• Neniam ĉeestis la festivalon? Bonege, vi estas preta por organizi ĝin.

• Komencu la ĉason por la perfekta ejo (kiu ne ekzistas). Ju pli ĝi estas netaŭga, des pli amuze estos taŭgigi ĝin por via festivalo.

• Kontrolu ke la administranto ne forgesu, ke vi alvenas tagon pli frue.

Fazo 2: La Adapto (t.e.: fari la neeblon ebla)

• Transformu tute netaŭgajn ĉambrojn en tre funkciajn spacojn (memoru: ne ekzistas regulo kiu malpermesas organizi prelegon en necesejo. Se ne estas spacoj: kreu ilin!).

• Konfrontu la lokan kuirarton kaj klopodu kongruigi ĝin kun la dietaj bezonoj de la esperantistoj (kuraĝon!).

• Portu kun vi la esperantistan travivilaron: glubendon, tondilon, esperantan flagon, bierojn, multe da espero, mikrofonon, laŭtparolilon kaj komputilon por organizi karaokean sesion.

Fazo 3: Travivado dum la Festivalo

• Dormi estas por malfortuloj (kvar horoj nokte estas lukso; se vi sukcesas dormi ses, io strangas).

• Atentu la sanstaton de la Papo. Ne konsultu la veterprognozon: ĝi malĝojigos vin. Akceptu kun malferma koro ĉiujn neatenditaĵojn de la vivo. Ili ne ĉiam estas negativaj.

• Serĉu ĉirkaŭe vian dopamin-, serotonin- kaj endorfinfontojn. Koncentriĝu pri la etaj atingitaj celoj, aŭskultu muzikon, kiu plaĉas al vi (esperantistan aŭ ne), manĝu bone (sed ne tro), sunumu (se la papo ne tro bonfartas), profitu la hazardajn paŭzojn por dormeti, dancu, lernu artefaritajn lingvojn (ekzemple... Esperanton!), akceptu ĉiujn pozitivajn reagojn de la partoprenantoj kaj la brakumojn de viaj karaj esperantistaj amikoj (ili vere helpas multe).

Fazo 4: Post-Festivalo (t.e.: la horo de la vero)

• Petu reagojn! Se ili estas negativaj, faru etan ploreton en la necesejo (la sola loko kie vi povas esti iom sola); se ili estas pozitivaj, ĝojuuuu kiel infano.

• Kontrolu la buĝeton. Se ĝi estas ekvilibra: miraklo. Se ĝi estas negativa: reprovu, vi estos pli bonŝanca venontfoje. Se ĝi estas pozitiva: multaj tostoj kaj memproponu vin mem por organizi la eventon ankaŭ venontjare.

Konkludo

• Simple, ĝuu.

Organizi festivalon estas simple mirinde. Kvankam lacigaj, festivaloj estas unika spacoj de kunhavigo, internaciismo, akceptemo kaj komunaj revoj. Ĉiu peno estas rekompencata. La fina sento, kiam la lasta partoprenanto foriras kaj la ejofermiĝas, estas simple nepagebla — ĉar Esperanto vivas, kaj la festivaloj estas ĝia koro. Kaj ni kiuj organizas kaj partoprenas ilin (inter projekciilo, kiu ne funkcias kaj noktofin', kiu transiras al nova tagiĝo) estas la korbatoj kiuj igas ĝin pulsi.

Gabrjelo
Italio

Mocio el TEJO aprobita ĉe Forumo Junulara Eŭropa

En sia Ĝenerala Asembleo en majo, Forumo Junulara Eŭropa[1] (FoJE) aprobis kaj adoptis mocion proponitan de TEJO. La mocio, titolita *Pritraktado de Lingva Diskriminacio en Internacia Junulara Moviĝeblo kaj Partopreno*, estis prezentita kaj defendita fare de la Oficisto pri Eksteraj Rilatoj David Ruíz Sánchez, kiu, kune kun la TEJO-Prezidanto Lucía Montserrat Fernández, reprezentis TEJO-n en la Asembleo.

La mocion kunsubskribis Nacia Junulara Konsilio de Katalunio[2] kaj Junularo por Eŭropaj Naciecoj[3], La mocio temas pri redukto de lingvaj baroj kaj batalo kontraŭ lingva diskriminacio por atingi egalan alireblon de ĉiuj junuloj sendepende de la lingvoj, kiujn ili parolas, kun kreskigado de interkultura kompreno kaj ebligado al junuloj aktive partopreni en socio. La mocio petas konkretajn agojn, kiel plibonigon de lingva alireblo en EU-programoj, kolektadon de datumoj pri lingva diverseco kaj inkludadon de multlingvaj rimedoj en partoprenaj procezoj.

Ĉar FoJE, ĝiaj membro-organizoj kaj partneroj ludas gravan rolon en la antaŭenigo de inkluziva partopreno por ĉiuj junuloj, ni emfazas la gravecon de konkreta kaj kolektiva agado por forigi tiajn barojn kaj doni egalajn ŝancojn al eŭropaj junuloj kiel intersektoran ŝlosilan elementon por la disvolviĝo de politikoj pri junularaj rajtoj.

Fine, kun 59 voĉoj favoraj, 3 kontraŭaj kaj 5 sindetenaj, tiu aprobita mocio estas historia atingo. Ĝi estis kaj la unua mocio antaŭenigita de TEJO en FoJE dum jardekoj, kaj la unua mocio adoptita de FoJE – la organiza voĉo de la eŭropa junularo – dum sia tuta historio kiu enhavas profilon kontraŭ lingva diskriminacio je internacia nivelo.

La plena artikolo troveblas en *tejo.org/tejo-foje-mocio/*. Ĝi enhavas la plenan tekston de la mocio en la angla kaj en Esperanto, aldone de la Strategia Plano 2021-2025 de TEJO kaj la dokumento pri la lingvopolitikaj pozicioj de TEJO.

David Ruíz Sánchez
Katalunio

1 Anglalingve: *European Youth Forum – YFJ*

2 Katalunlingve: *Consell Nacional de la Joventut de Catalunya – CNJC*

3 Anglalingve: *Youth of European Nationalities – YEN*

Abonu nun por 2025 kaj ricevu la plej mojosan revuon en Esperanto.

Kotiztabelo de UEA por 2025

La jenaj tarifoj validas ankaŭ por postaj jaroj, se la pago estas farita antaŭ la oficiala komuniko de nova kotiztabelo.

Lando (valuto)	MB(-T)	MA(-T)	MBT-50%	MBT-75%	SA	Kto	PT
Aŭstralio ($)	70	115	35	17	75	40	135
Aŭstrio (€)	44	74	22	11	45	25	88
Belgio (€)	44	74	22	11	45	25	88
Brazilo (€)	14	44	7	4	45	12	44
Britio (£)	40	67	20	10	41	23	79
Ĉeĥio (€)	27	57	14	7	45	18	44
Danio (Kr)	330	560	165	85	335	190	660
Estonio (€)	27	57	14	7	45	18	44
Finnlando (€)	44	74	22	11	45	25	88
Francio (€)	44	74	22	11	45	25	88
Germanio (€)	44	74	22	11	45	25	88
Greklando (€)	27	57	14	7	45	18	44
Hispanio (€)	27	57	14	7	45	18	44
Hungario (Ft)	4560	14300	2280	1140	15000	3900	14300
Irlando (€)	44	74	22	11	45	25	88
Islando (€)	44	74	22	11	45	25	88
Israelo (€)	27	57	14	7	45	18	44
Italio (€)	44	74	22	11	45	25	88
Japanio (¥)	5720	9620	2860	1430	5750	3250	11440

Lando (valuto)	MB(-T)	MA(-T)	MBT-50%	MBT-75%	SA	Kto	PT
Kanado ($)	70	115	35	18	71	39	135
Kroatio (€)	14	44	7	4	45	12	44
Latvio (€)	14	44	7	4	45	12	44
Litovio (€)	14	44	7	4	45	12	44
Nederlando (€)	44	74	22	11	45	25	88
Norvegio (NOK)	428	720	214	107	490	245	850
Nov-Zelando ($)	76	126	38	19	79	43	150
Pollando (€)	14	44	7	4	45	12	44
Portugalio (€)	27	57	14	7	45	18	44
Rusio (€)	14	44	7	4	45	12	44
Slovakio (€)	27	57	14	7	45	18	44
Slovenio (€)	27	57	14	7	45	18	44
Svedio (SEK)	462	780	230	115	530	265	925
Svislando (CHF)	52	87	26	13	53	30	104
Usono ($)	54	89	27	14	55	30	106

Financita de la Eŭropa Unio

Se via lando ne estas en la listo, bv. kontroli la kotizojn ĉe: uea.org/alighoj/kotiztabelo
MB: Membro Baza: kun reta revuo Esperanto, reta Kontakto, Delegita Reto (reta jarlibro), Rabato ĉe UK kaj IJK.
MA: Membro-Abonanto: Kiel MB plus la revuo Esperanto papere.
MB(-50%): Baza Membreco kun TEJO-rabato (membro estas 20–25-jara je la komenco de la kotizata jaro).
MB(-75%): Baza Membreco kun TEJO-rabato (membro ne estas pli aĝa ol 19 jaroj je la komenco de la kotizata jaro).
SA: Simpla abono al la revuo Esperanto, sen membreco en UEA.
KTO: Abono al la revuo Kontakto, sen membreco en UEA/TEJO.
PT: Patrono de TEJO: pagas la kotizon por subteni TEJO-n (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon Kontakto kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO.

Germana Esperanto Junularo

JES

revenas al Germanio!

28.12.25 – 4.1.26

Burg (Spreewald)

Informoj kaj aliĝilo:

jes.esperantojugend.de